Ĉu nova energio de la junularo?

Ĉi-jare aperis la unua papera jara volumo de Scienca Revuo. Fakte ĝi ne vere estis jara volumo, ĉar ĝi enhavis artikolojn rete aperintajn dum du jaroj. Krome ĝi enhavis la tutan bibliografion de Scienca Revuo ekde 1949.

Malrapide envenadas nova materialo por Scienca Revuo tra nia retejo kaj mi kiel redaktisto rimarkas, ke la enpaĝigo de pli da materialo estus tro temporaba por mi, kiu krom sian civitan laboron kiel inĝeniero kaj la laboron por Scienca Revuo faras ankaŭ muzikon kaj instruadon de Esperanto. Defio de la sekva jaro estas starigi pli fortan teamon, kiu ne nur verkas artikolojn, sed ankaŭ helpas altkvalite redakti artikolojn por Scienca Revuo.

Fine de novembro venis la malĝojiga novaĵo, ke mia antaŭulo Rüdiger Sachs forpasis. Liajn gravajn longdaŭrajn meritojn pri la Esperanto mondo, speciale pri nia asocio ISAE, honorigas la nuna prezidanto de ISAE José-Antonio Vergara en speciala eseo.

Dum la Internacia Junulara Kongreso en Nazareto la tutmonda esperantista junulara organizo (TEJO) decidis starigi komisionon pri scienca kaj faka agado. Kiel redaktisto de Scienca Revuo mi elkore subtenas tiun agadon kaj antaŭĝojas ties rezultojn aperontajn en Scienca Revuo

Fidelaj aŭtoroj kontribuis al tiu ĉi eldono. Hiroshi Nagata verkis pri infana lingvolernado. Aperas komento pri artikolo de Łomnicky aperinta en la pasinta eldono de Scienca Revuo. Tiaj debatoj vigligu la sciencan kunlaboron ankaŭ en la Esperanta medio. Denove aperas artikolo en la rubriko “scienco kaj socio”, ĉi foje pri ĉifrado, teknologio pli kaj pli grava.

Mi deziras al ĉiuj legantoj bonan legadon kaj instigon verki proprajn artikolojn por Scienca Revuo.

Ludwigsburg, decembro 2013

Johannes Mueller